

JARLIBRO

de la Esperanto-Movado

Esperanto

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto
V-18679/22

(1934)

1934



Universala Esperanto-Asocio
1 Tour de l'Île, Genève, Svislando

La plej impona verko

kun almenaŭ 600 tekstopaĝoj dense presitaj,
grandformataj kaj 300 paĝoj da ilustraĵoj
en du dikaj volumoj, estos la

Enciklopedio de Esperanto

Ĝi pritraktas per metodoj de scienca laboro nian
tutan movadon, ekde la naskiĝo ĝis la plej lastaj
tempoj. Detala historio pri la landa kaj laka mov-
adoj, pri la gazetaro, proksimume 2000 biografioj,
konatigo de kelkaj centoj da diversaj gravaj libroj,
multaj interesaj, nekonataj faktoj kaj multaj aliaj
detaloj faras la verkon por ĉiu praktikanto, ĉiu
propagandisto, ĉiu instruisto kaj ĉiu komercanto, do
por ĉiuj Esperantistoj nepre necesa manlibro.

La verkon redaktis laŭ la iniciato de I. Ŝirjaev
Ludoviko Kőkény.

En la redakcio kunlaboris: V. Bleier kaj K. Kalocsay
La presprovaĵojn reviziis: M. C. Butler kaj T. Indra


Kunlaboris la plej konataj Esperantistoj

Prezo de unu volumo 15.— Fr. sv. broŝurita kaj 17.— Fr. sv. bindita.
Aldonu 10% por sendkosto. — Aŭgantoj kaj anoj de Asocio de
Esperantistaj Libro-Amikoj ricevas ambaŭ volumojn en 1934
atrankite broŝurita por Fr. sv. 14.—, bindita Fr. sv. 16.—.

Pri aliĝo al AELA, partopaga favoro por Enciklo-
pedio petu la senpagan prospekton de

Literatura Mondo kaj Asocio de Esp. Libro-Amikoj
Hungarujo, B u d a p e s t, IX. Mester-u. 53. V. 5

La
SIMBOLO
de
SERVADO



ĈE LA
TUTA MONDO

CALLENDER'S
CABLE & CONSTRUCTION CO., LTD.
Hamilton House Victoria Embankment, London E.C.4.
Göteborg, Gambia S.S.4. Göteborg, Gambia S.S.4.



Fundamento de Ispografio

de F. A. Hamann ☆ La baza libro de

Internacia Steno-Pazigrafio

Simpla mallongskribo por ĉiuj lingvoj kaj uzoj

Sur dek fundamentaj principoj

Nur dek fundamentaj reguloj

Specimeno en Prononca Skribo (onetika plenskribo) de Ispo en Esperanto, angla, franca, germana, hispana kaj itala lingvoj

Prezo: 55 cendoj (aŭ egalvaloro)

Ŝlosilo de Esperanta Ispografio

ebligas legi ion skribitan en Prononca aŭ en Koresponda Skribo, kiel ĉi tiun Ispogramon:

eliskribo de A. B. C.

Prezo: 10 cendoj (aŭ egalvaloro)

Ŝlosiloj kaj lernolibroj en diversaj naciaj lingvoj estas en preparo; jam aperis:

Key to English Ispography (10 cendoj)

Guide to English Ispography (55 cendoj)

por lerni stenografi angle en Koresponda Skribo

Mendu ĉe:

Ispo-Eldonejo, 611 N. 63. St., Wauwatosa

(Wisconsin, Usono)

aŭ ĉe

Universala Esperanto-Asocio (Libroservo de UEA)

1, Tour de l'Île, Genève (Svislando)

EDINBURGO

Historia/Romantika/Pentrinda



Abundas je lokoj pitoreskaj kaj historie interesaj. Provizas por la libertempulo senliman variecon de plezuro



Oportuna centro por viziti famajn Skotajn pejzaĝojn



Bonega servado vagonare kaj aŭtomobile al ĉiu parto: ĉiutagaj ekskursoj dum la somero al „La Trossachs“, „Melrose“, la „Scott“ Kamparo kaj la skotaj lagoj



Vastaj oportunoj por la Golf-ludo, la Teniso kaj aliaj sportoj

Por plena informo kaj oficiala gvidilo oni sin turnu al

The Town Clerk, City Chambers, Edinburgh



Białystok (Polujo)

Famekonata kiel naskurbo de Dro Ludoviko Zamenhof, kreinto de Esperanto. — Fondita kiel malgranda vilaĝo en la jaro 1320 apud la rivereto Biala („Blanka“). La historio de Białystok estas ligita kun tiu de polaj riĉaj nobelaj familioj, al kiuj tiama vilaĝo Białystok apartenis. De post kiam Białystok transiris en la posedon de la familio Branicki, komenciĝas ĝia rapida disvolviĝo. En duono de la XVIIIa jarcento Białystok akiras la rajtojn de urbo. La hetmano Jan Klemens Branicki konstruis en Białystok belegan palacon, ĉirkaŭitan de luksega parko. La tutaj estis nomita „La Versailles de Podlasie“ (arbarregiono); ĝi konserviĝis ĝis nun. La palaca parko estis aranĝita laŭ la planoj de ing. Lenôtre, la kreinto de parko en Versailles. En la jaroj 1795—1807 Białystok provizore apartenis al Prusujo kaj la palaco de Branicki estis vendita en la jaro 1802 al la prusa reĝo. Sekve de Tilsit'a packontrakto Białystok transiris sub regadon de Rusujo kaj nur en la jaro 1919 denove revenis al Polujo, kun kiu ĝi estas nediviseble ligita en sia historio. Dum la lastaj 15 jaroj Białystok montras senĉesan disvolviĝon. La estetika aspekto de la urbo tre pliboniĝis. Parto de la historia parko de Branicki estas transformita je plantaleoj por publika uzo. La stratoj estas plibeligitaj per bedoj, la trotuaroj estas plilarĝigitaj. Nun estas konstruata moderna „Popola Domo de Marŝalo Piłsudski“, kiu entenas teatron, prelegajn salonojn, bibliotekojn, ejojn por kulturklerigaj societoj ktp. Proksimtempe ankaŭ estos komencita la konstruado de Zamenhof-monumento; la fundamentoj estis enmurigitaj en la ĉeesto de Esperantistaj gastoj el tuta mondo. La kultura vivo de la urbo ĉiam pli progresas. Białystok estas grava industria centro (teks- kaj drapfabrikoj, maŝinfarejoj, ledtanejoj, vitrofarejoj, brikejoj ktp.). Białystok'aj produktaĵoj estas eksportataj al plej malproksimaj landoj. — Sidejo de vojevodo, distrikta juĝejo, financa ĉambro kaj multaj regnaj oficejoj. — La Magistrato (kulturkleriga fako) sendas senpage laŭ postulo okpaĝan ilustritan gvidlibron tra Białystok, eldonitan en Esperanto sub aŭspicioj de la Magistrato kaj de Turisma Servo de UEA. Krom tio por 1,— Frk. sv. estas ricevebla ampleksa gvidlibro en pola lingvo (kun vasta resumo en Esperanto), eldonita de Pola Turista Societo.

La Magistrato donas ankaŭ ĉiujn pliajn informojn pri la urbo.

Esperanto - Eldonejo N. Szapiro

Warszawa, Nowolipki 8, Pollando

Pola poŝtekkonto 16.562

Leono Vienano: „Esperanto per Esperanto“

Lernolibro de la lingvo Esperanto laŭ senpera (rekta) metodo. Kun metoda enkonduko. Nia gazetaro akceptis la jenan lernolibron kun ĝoja saluto kaj rekomendis ĝin kiel originale prilaboritan kaj bonan rektmetodan lernilon. Detalojn pri la sistemo de l' libro kaj ĝiajn tutmondajn recenzojn legu en niaj prospektoj, senpage alsendataj al ĉiu postulanto. Prezo: 1 sv. fr. kaj 10% sendkosto

„Esperantlingva Novelbiblioteko“

Redaktata de Leono Vienano

Ĝis nun aperis ses diversaciaj noveloj kun streĉa enhavo („Literaturaj frandaĵoj“ laŭ la esprimo de l' recenzistoj) kaj verkita en facila, flua, korekta stilo. La recenzistoj rekonis la redaktoron de l' biblioteko kiel unuarangan stiliston („pure Zamenhofa stilo“).

Prezo de ĉiu volumo: 0,45 Frk. sv. kaj 10% sendkosto.

1. El la hebrea: *N. Jeruŝalmi (Vienano): Eksiĝo*
2. El la pola: *Lidja Zamenhof: La vizio. La veŝto*
3. El la rusa literaturo: *P. Romanow (Drawner): La mistero. Unu horo*
4. El la hungara literaturo: *L. Biro: Fraŭlino Ida. Porzolt: La vojo malsupren (Rereips)*
5. El la dana literaturo: *H. Bang (Vienano): La hontemulo. La unua kiso*
6. El la sveda literaturo: *A. Strindberg (Vienano): Amo kaj pano. Aŭtuno*

Naum Jeruŝalmi: „Merkado la azenpelisto“

Belega romano el la tempo de la mondmilito en Hebren kaj Jerusalem. El la hebrea originalo tradukis kaj komentis Leono Vienano

Broŝ. 2.— Tole bindita 3.— Fr. sv. kaj 10% sendkosto.

E. Mihalskij: Kantoj de l' Amo

Prezo: 0,70 Er. sv. kaj 10% sendkosto


„Flirto Esperanta“. Prilaboris Edz-peranto

Facila, korekta kaj alloga stilo. Trafaĵ frazoj. Bona amuzilo.

Prezo: 0,50 sv. fr. kaj 10% sendkosto

Gaja Lernolibro

Kun 120 bonhumoraj artaj bildoj



Rekta
metodo

Kompleta
kurso en
amuza maniero

RM 1.75 aŭ 7 respondkuponoj poŝtaj aŭ de UEA.
Poŝtaj respondkuponoj estas haveblaj en ĉiu poŝtejo.
Unu respondkupono valoras la aŭranton
de eksterlanda letero.

Aĉetebla ĉe

Universala Esperanto-Asocio

(Libroservo) Genève, Svis.

Heroldo de Esperanto

94, Brüsseler Strasse, Köln a. Rh.
kaj ĉe la aŭtoro

C. Walter, Berlin W 10
Hohenzollernstr. 11 (Germanujo)

La Chaux-de-Fonds

Svislando Kantono Neuchâtel
Tutmonda centro de fabrikado kaj komerco de
horloĝoj

Urbo lerneja franclingva, prezentas okazon por lerni
la francan lingvon kaj samtempe profesion en siaj
lernejoj Duagradaĵ, Gimnazio, Komerca Lernejo,
Teknika kaj Ĵarta Lernejo / Centro favora por
ekskursoj kaj sportoj, someraj kaj vintraj.
Alteco: 1000 m

La Svisa Horloĝa Salono okazos en La Chaux-de-Fonds de 25 Aŭgusto ĝis 9 Septembro 1934
Por ricevi pliajn sciigojn senpage, skribu al:
**Association pour le développement de
La Chaux-de-Fonds (A. D. C.)**

Mainz

Vizitula „oran“ Mainz ĉe la Rejno kaj Majno,
la pordego al la meza Rejno, situata en belega
pejzaĝo, la urbo de vino kaj de bonhumoro.
La komenco kaj fino de ĉiuj Rejnvojaĝoj. La restad-
ejo por ekskursoj al la Taŭnomontaro, al la Rejn-
regiono, al Rejnheslando, al la Nahevalo. Mondfamaj
muzeoj kaj kolektaĵoj. Miljara katedralo. Preĝejoj
laŭ ĉiuj stiloj. Pentrinda civito. Domoj de patricioj
kaj palacoj de nobeloj.

Informoj kaj prospektoj per la
Trafikoficejo Mainz (Verkehrsamt), Bahnhofstr. 3

Bankservo



kaj vojaĝo

Vojaĝ-ĉekoj
Fremdaj devizoj
Ŝtal-fakoj

Esperanto-sciantaj Oficistoj

GEBR. ARNHOLD

fondita 1864

DRESDEN A 1

BERLIN W 8

Waisenhausstr. 18/22

Behrenstr. 62/63

Hotel „PRAG“, Beograd

Jugoslavujo, Kraljice (reĝino) Natalije 27

En centro de la urbo, tre proksime de la stacidomo. Centra hejtado, fluanta varma kaj malvarma akvo, restoracio.

Rekomendinda hotelo vizitata de fremdaj Esperantistoj (Marta Root, Marzien, Nabi, Carpenter, Hans Jakob kaj aliaj)

Moderna komforto je moderaj prezoj.
Esperanto parolata Telefono: 26-101

Interrilata Adresaro

Jarlibro de la Esperanto-Movado 1934

La celo de tiu ĉi Interrilata Adresaro estas, helpi la intersamideanan korespondadon kaj interŝanĝon. Per ĝi UEA reprenas malnovan kutimon, disponigi lokon por tiuj anoncetoj en la plej disvastigita eldonaĵo de la movado: la Jarlibro.

Anoncanto havas la devon, respondi almenaŭ unufoje al korespondado sendata al li, sekve de tiu ĉi anonceto. Okaze de plendoj, la redakcio de la Jarlibro informiĝos kaj laŭnecese avertos pri nerespondontoj en la revuo de la Asocio.

Uzataj mallongigoj:

L — letero; PK — poŝtkarto; PI — poŝtkarto ilustrita; PM — poŝtmarko; bfl — poŝtmarko bildflanke; fot-ajoj — fotografajoj; kĉl. — kun ĉiuj landoj; c. r. — certe respondos.

Arnhem (Nederlando). — Dro C. BAART DE LA FAILLE, Röellstr. 8; PM eŭropaj, kolonioj britaj, francaj.

Atbara (Afriko, Sudano). — S-ro N. S. TAHAN, P. O. B. 5o; PM, PI bfl.

Atbara (Afriko, Sudano). — S-ro T. M. GIRGIS, P. O. B. 5o; PI, PM.

Bakov nad Jizerou (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Fr. PYTLOUN, UEA-Del., respondas al ĉiuspecaj demandoj.

Bakov nad Jizerou (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Josef SLEPIČKA, instruisto; PI kĉl. Respondo garantiata.

Barcelona (Katalunujo, Hispanujo). — S-ro Josep GIBBERT, Str. Planeta 16; pri diversaj temoj kĉl., PI.

Barcelona (Katalunujo, Hispanujo). — S-ro Mateo VILLANUEVA-SALARIČH, Str. Nou de Sta. Eulàlia, 9, 2, 2; L, PK kĉl., preferinde pri internacia politiko; c. r.

Barcelona (Katalunujo, Hispanujo). — S-ro Francesco BARRIL-CISTARÉ, Str. Muntaner, 215, 3^o, 2; L, PI pri diversaj temoj.

Bello Horizonte (Brazilo, Minas Geraes). — S-ro Lincoln Martins VIANNA, UEA-Del., Grao Mogol 197; PI, L.

Bello Horizonte (Brazilo, Minas Geraes). — S-ro Ivan Martins VIANNA, Grao Mogol 197; PM, precipe aerajn.

Bello Horizonte (Brazilo, Minas Geraes). — Dro Luiz de AZEREDO COUTINHO, Caixa 450; L, PI, PM.

Bitolj (Jugoslavujo). — S-ro Milan MISOVIC, instruisto, vegetarano, antialkoholulo, biciklisto, montar-amanto, redaktoro de „La Nova Lumo“; L, PI kun samcelantaj samideanoj el ĉiuj landoj.

Bremerhaven (Germanujo). — S-ro Hans ECKARDT, fajrobrigadisto, Rampenstr. 37; PM.

Brno-Horní Heršpice (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Emil VAGNER, Mostní ulice 99; PM kĉl. kaj adresojn de korespondontoj por la kursanoj.

Bruxelles 3 (Belglando). — S-ro Victor LAMBERTT, 286 Bd. Lambermont; PM, akceptas nur francajn koloniajn PM eldonitajn post 1920, afranku filatelie; c. r.

Brüx (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Joseph BELLER, Jakobstr. 1630; PM, PI kĉl.; c. r.

Bury (Britujo). — S-ro J. R. KING, UEA-Vicdel., 65, Tootington Rd., Elton; PK, L kĉl. pri politiko, internacia novaĵo, aktualaj temoj. Respondo garantiata.

Ĉeské Budějovice (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro ing. Jaroslav HOLAT, Jeronýmova No. 13, I; PI, PM; c. r. matematiko, fonetiko, gramatiko.

Ferrol (Hispanujo). — S-ro Feliciano OLIVAN, mara oficiro, UEA-Del., ĝis Julio Crucero „Libertad“; L, PI kĉl., precipe kun Azio, Oceanio; c. r.

Ferrol (Hispanujo). — S-ro José M. GRAU, mara studento, Crucero „Libertad“; L, PK kĉl., precipe kun ekstereŭropanoj, c. r.

Ferrol (Hispanujo). — S-ro Angel SEIJO, mara studento, Crucero „Libertad“; L, PK kĉl., c. r.

Ferrol (Hispanujo). — S-ro José HERMIDA, mara studento, Crucero „Libertad“; L, PK kĉl., c. r.

Ferrol (Hispanujo). — S-ro José Pérez VARELA, mara studento, Crucero „Libertad“; L, PK kĉl., c. r.

Ferrol (Hispanujo). — S-ro Jerónimo BOUZA, mara studento, Crucero „Libertad“; L, PK kĉl., c. r.

Gersdorf 162 (Germanujo, Bez. Chemnitz). — S-ro Reinhard WOLF, UEA-Del.; PI kun ne-apartenantoj de la blanka raso, c. r.

Gijon (Hispanujo). — S-ro Alfredo VILLA, profesoro pri matematiko kaj Esperanto ĉe la Ateneo Obrero; PI pri internacia politiko kaj matematiko.

Gijon (Hispanujo). — S-ro Rojo GUTIERREZ, profesoro, str. Pedro Menedez 3 pral.; PI, L pri diversaj temoj.

Goldenöls (Ĉeĥoslovakujo, Post Gabersdorf bei Trautenuau). — S-ro Franz MAYER jun.; Esperanto-glu- kaj sigelmarkoj, ankaŭ kontraŭ PM.

Helsingborg (Svedlando). — S-ro E. RASMUSSEN, Upsalagatan 6; L, PK, PM.

Hradec Králové II-295 (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Karel HUTAR, komerckomizo; L, amatoraj fotoj nur kun junaj fraŭlinoj.

Jičín (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro ing. Josef V. MAREŠ, profesoro de komerca lernejo, UEA-Del.; L pri komercaj aferoj, PM, PI kĉl.; c. r.

Jičín (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro J. KUČERA, teknika oficisto, Husova tř. 101; PM, PI kĉl.

Jičín (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Jiří MACHAČEK, Husova tř. 52; PM, PI kĉl.

Jičín (Ĉeĥoslovakujo). — F-ino Jarmila MACHAČKOVA, Husova tř. 52; PI, fot-ajoj kĉl.

Jinačovice p. Kuřim u Brna (Ĉeĥoslovakujo, Moravia Silezio). — S-ro Oldřich HALAS, tipografo, L, PK kun ĉiulandaj seriozaj Esperantistoj, kiuj lin volonte akceptus dum preparata vojaĝo tra la mondo. Religio natura kaj spirita vivo kontraŭ moderna vivaĉo, nobla literaturo, sincera amikeco.

Karlsruhe (Germanujo). — S-ro Friedrich HELFERS, Postschliessfach 165; L, PI, PM, fot-ajoj, gazetoj kĉl., c. r.

Kedainiai (Litovujo). — S-ro L. ALSEIKA, Žemtvark; L, PI, gazetoj kĉl.

Košice (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Ludvík JANEČEK, direktoro de malliberejo, Sanýtrová 1; PM laŭ Michel aŭ kvanton kontraŭ kvanto, kĉl.; ĉiam respondas.

Košice (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro ing. J. FISCHHOF, profesoro, Komenského 2; kun Uganda, Kenia aŭ aliaj landoj de estinta germana Orienta Afriko.

Košice (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Josef WEIDL, industria oficisto, Mlýnská 21; ŝanĝas PM laŭ Yvert aŭ Senf.

- Košice* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Jozef GYÖRGYI, poŝtoficisto, Hradková 12; kun poŝtoficistoj de ĉiuj landoj.
- Košice* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Tibor BOBULA, 21-jara studento, Vodná 22; kun-ĝstudentoj; respondo garantiata.
- Kouvola* (Finnlando). — S-ro Sv. KIVINEN, instruisto; PI kun naciaj flagetoj.
- Kyynäre* (Finnlando). — S-ro Lauri ARONEN, UEA-Del.; PK, L.
- Lázně Bělohrad* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro František PECH, terkulturisto, Masarykovo nám. 31; serĉas bonkarakterajn ĝeamikojn, L, PI, PM.
- Lhota pod Strání*, p. Nový Hradec Králové (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Josef STEHNO, bakisto; L, PI kĉl.
- Lhotka u Litultovic* (Ĉeĥoslovakujo, Moravia Silezio). — S-ro Jan WALTER, 20-jara; L, PI, fot-ajoj kĉl.; c. r.
- London* (Britujo). — S-ro Jack PEART, BM/CEFP; kun junuloj.
- Louny* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Jar. BUDINKA, bankoficisto, UEA-Del., No. 95; PI (nur bĉl!), PM kĉl.; c. r.
- Lwów* (Polujo). — S-ro Tadeo SKOTYNSKI, diplomita instruisto de Esperanto, Rynek 36; L, PI, PM, fot-ajoj kĉl., interesiga pri filozofio, historio, kooperado, homeopatio kaj okultismo; c. r.
- Milano* (Italujo). — S-ro Prof. D. CARBONE, Via Darwin 9; L kĉl. pri sciencaj temoj, precipe terkultura kaj industria bakterologio, imuneco ĉe la kreskaĵoj.
- Montelupo Fiorentino* (Italujo). — S-ro Bruno LOZZI; PM nur kun Oceanio.
- Monticchiello Siena* (Italujo). S-ro Corrado CERRI, instruisto de unua-grada lernejo; kun samprofesiaj(in)oj pri lernejaferoj.
- Moritzburg-Eisenberg* (Germanujo, Sachsen). — S-ro M. SPINDLER, UEA-Del.; L, PI, PK kĉl., ĉiam kaj tuj respondas.
- Mukaĉevo* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro A. VEVERKA, Internat. ul. 42; daŭre interŝanĝas kĉl. PM, PI kun bildoj de signifaj kulturverkoj kaj monumentoj, naciajn kantojn,

sentencojn de eminentaj pensuloj ĉiutempaj, pensojn pri abelkulturo kaj fruktarba kulturo, artoj kaj sciencoj, semojn de arboj kaj floroj, Jacquard-teksaĵojn.

- Nagykörös* (Hungarujo). — S-ro Nemes Szabó KAROLY, Rákóczi-u. 8, universitato; L, PI bĉl, fot-ajoj pri plej diversaj temoj (precipe: popolkostumo, popolarto) el tuta mondo; PM (kvanton kontraŭ kvanto); ĉiam respondas.
- Nagykörös* (Hungarujo). — S-ro Antonio KHIRER, I. Almos u. 2; PM (nur Eŭropo); c. r.
- Nagykörös* (Hungarujo). — S-ro Bekő GYULA, bankoficisto; PM kĉl.
- Nieder-Hanichen bei Reichenberg* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Heinrich MICHALEK, propagandejo de Esperanto; kolekta kaj interŝanĝas ĉiajn Esperantaĵojn.
- Nieuw-Scheemda* (Nederlando). — S-ro K. H. SPORTEL, lernejestro; PI, fot-ajoj, L kĉl., respondo garantiata.
- Nymburk* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ino Rudka PAVLIKOVA, ul. Ferd. Schulze No. 922; PI, L kĉl.
- Olot* (Katalunujo, Hispanujo). — S-ro Josep ESTARTUS, str. Germà 6; PI, L, ilustritajn gazetojn kĉl., precipe kun Hungarujo, Grekujo, Belgujo, Norvegujo kaj Svedujo.
- Oppeln* (Germanujo, Oberschlesien). — S-ro JACOB, Mross-str. 22; PI bĉl, nacilingvaj Esperanto-lernolibroj (rekompenco laŭdezire) kĉl., escepte Germanujo; c. r.
- Penzig* (Germanujo, Oberlausitz). — S-ro Karl NEJEDLI, UEA-Del., Friedrichstr. 18; PI nur kun Afriko, Azio, Aŭstralio kaj Ameriko.
- Praha VII* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Jaroslav HERMAN, Dobrovského 18; PI, PM, L; c. r.
- Praha* (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Karel STRAKA, Strašnice 94; PI, L, PM (Yvert), prefere rekomendite, aerpoŝte kĉl.; c. r.
- Rakosszentmihaly* (Hungarujo). — S-ro Teodoro KOVACS ŝatus korespondadi kun anoj de 1' finn-ugra, ural-altaj (turanaj) lingvobranĉoj, pri la parenceco, aŭ kun iu ajn pri turismo, stenografio, cigana kaj aliaj lingvoj, skribdeveno (alfabeto), fervojaj-fremdultrafikaj aferoj; ŝatus ricevi reklam-afiŝojn pri fremdultrafiko-fervojoj kaj montregionoj, iajn presajojn pri urboj kaj regionoj.

Rožmitál pod Třemšínem (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro František LANG, No. 238; kun junaj sportistoj ĉiulandaj.

Sadská (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Jan FORST, faka instruisto; PI, L, PM kĉl.

Samarinda (Borneo). — S-ro LIM Ek Thoean, komercisto, UEA-Del.; PK, PI, L kĉl.; c. r.

Seattle (Usono, Washington). — S-ro R. C. MARBLE, 2708 47th S. W.; L kĉl. pri la lingvistiko, la filozofio kaj preskaŭ ia tempo; tuja respondo garantiata.

Semarang (Nederlanda Hindujo, Java). — S-ro Tjong Hie LIEM, sendas kontraŭ 2 Fr. sv. po 1 ekz. „Javaj Legendoj“, „Historio de Saidjah“, „Malaja Slosilo“, 1 n-ro „Hinda Esperantisto“.

Southall (Britujo, Middlesex). — S-ro Henry G. WELLS, 3 Clear View, Havelock Road; PI, L, prefere kun IOGT aŭ aliaj abstinuloj; c. r.

Stockheim bei Bad Wörishofen (Germanujo). — S-ro Gabriel SCHORER; PI pri preĝejoj kaj monaĥejoj kĉl., PM (100-300 kontraŭ sama kvanto).

Stonaca 100 (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Paulo BARTULEC; PI bfl, urbvidajoj, fot-ajoj, portretoj de ŝtatestroj, naciaj kostumoj, PM, glumarkoj de Esperantistaj universalaĵj; naciaj kaj SAT-kongresoj kĉl.; c. r.

Stuttgart (Germanujo). — F-ino Maria SCHMID, Schlossstr. 58; L, PI kĉl., c. r.

Stuttgart-Zuffenhausen (Germanujo). — S-ro Adolf DRAUTZ, UEA-Vicdel., Winterhaldenstr. 37; L, PI bfl kĉl., c. r.

Torun (Polujo). — S-ro M. GRODZKI, leŭtenanto-emeritulo, ul. Mickiewicza 67; PM kĉl. (kvanton kontraŭ kvanto, valoron kontraŭ valoro aŭ katalogo Yvert), ne sendas unua. Respondas ĉiam.

Toulouse (Francujo). — Gefratoj CASTEL, 22 Str. Jacques Lafitte; PI kĉl., precipe kun Germanujo, Hispanujo, Italujo kaj Sovetunio.

Turnhout (Belglando). — S-ro Polydore STAPPERS, filatelisto, Kerkstraat 1; PM laŭ mankolisto, bazo Yvert.

Trnava (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Nándor LELOVITS, bankoficisto, Halenárska 3; L, PI bfl kĉl., monerojn, ne pli validan papermonon; c. r.

Trenčianské Teplice, banloko (Ĉeĥoslovakujo). — S-ino Barbora BRICHÁCOVA, edzino de faka instruisto, Vila Riviera; L, PI bfl kĉl.; c. r.

Viipuri (Finnlando). — S-ro Aleks. PUOLAKKA (58-jara), F-ki Kaivokatu 10 as 1; L, PK.

Vincennes (Francujo, Seine). — S-ro Paul JOUSSOT, 104 rue de Montreuil; L, PK pri ĉiuj interesaj temoj.

Viterne (Francujo, Meurthe et Moselle). — S-ro Jean WEBER, fruktnegocisto, specialaĵo de prunoj: „mirabeloj“ de Loreno; PI, L, ĉefe pri fruktnegoco.

Vys. Mýto (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro Josef VANIS; PM, PI bfl kĉl., ankaŭ transmaraj; c. r.

Washington (Usono, D. C.). — S-ro Jos. LEAHY, 2140 N. St., N. W.; fot-ajoj, PM (truitaj, gumitaj), senlimaj uzoj, de ia ajn fot-aĵo (originalo nedifektita).

Wauwatosa (Usono, Wisconsin). — ISPO (Internacia Stenopazigrafio) celas fariĝi „la dua skribo por ĉiuj“. (Vidu paĝon III). Aligu kiel amiko de Ispo al la Universala Ispo-Asocio.

Zlataritza (Bulgarujo, Elensko). — S-ro Nikola J. KAPARASEV, grupa prezidanto; L, PI, fot-ajoj kĉl.; c. r.

Zlataritza (Bulgarujo, Elensko). — S-ro Bogomil RADOSLAVOV, UEA-Del., fondinto de Universala Esperanto-Kinofoto-Asocio, kreinto de Oficiala Esperanto-Telegrafa Alfabeto; pri muzikmetodo, stenografio kĉl.

Zlonice (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro V. FAIGL, juristo; eŭropajn PM laŭ Yvert, Michel.

Zwickau (Ĉeĥoslovakujo, Bohemio). — S-ro Ant. J. SCHILLER, UEA-Del., oficisto, Martinthalerstr. 458, II; L, PK, PM, gaz. kĉl.; c. r.; Esperanto-Servo.



Ozonproduktilo Domine

Sanigadas, purigadas, parfumadas la aeron
de ĉiuj lokoj per **OZONOL**
fortega ozonita desinfektilo

Purigu viajn hejmojn, defendu vian sanon
per ozonitaj produktoj


Tuj postulu **DOMINE** 12 rue Bleue
detalojn de **PARIZO IXE**

POŝTMARKOJ

Elektaĵoj de poŝtmarkoj el Belglando,
Luksemburgo, Kongolando kaj Francaj
Kolonioj. Plenumado de mankolistoj
je malkaraj prezoj laŭ ĉefaj katalogoj.

Victor Lamberts, 286 Bd. Lambermont, BRUSELO 3

Puŝo-ĉaretoj fortikaj kaj malmultekostaj.



De Jong

Fabrika de puŝo-ĉaretoj

Giessendam

(Nederlando)

Samideanoj komercu!

Mi

estas preta korespondi pri komerco de mia regiono
kun la tuta mondo.

havigos komercajn informojn.
serĉas vendantojn kaj aĉetantojn.
interrilatiĝos vin. Skribu detale.

Joseph W. Dubin

808 W. Sedgwick Street, Philadelphia Pa., U. S. A.

JARLIBRO

DE LA

ESPERANTO-MOVADO

1934

(22a Jaro. Unua Jarlibro aperis 1908.)

Ne aperis 1915, 1917—1919.

La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti represata,
ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U. E. A.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
1 TOUR DE L'ILE, GENÈVE, SVIS.

Copyright by Universala Esperanto-Asocio, Geneva, Switzerland

Kalendaro 1934

Januaro					Februaro					Marto							
D		7	14	21	28	D	—	4	11	18	25	D	—	4	11	18	25
L	1	8	15	22	29	L	—	5	12	19	26	L	—	5	12	19	26
Ma	2	9	16	23	30	Ma	—	6	13	20	27	Ma	—	6	13	20	27
Me	3	10	17	24	31	Me	—	7	14	21	28	Me	—	7	14	21	28
Ĵ	4	11	18	25	—	Ĵ	1	8	15	22	—	Ĵ	1	8	15	22	29
V	5	12	19	26	—	V	2	9	16	23	—	V	2	9	16	23	30
S	6	13	20	27	—	S	3	10	17	24	—	S	3	10	17	24	31
Aprilo					Majo					Junio							
D	1	8	15	22	29	D	—	6	13	20	27	D	—	3	10	17	24
L	2	9	16	23	30	L	—	7	14	21	28	L	—	4	11	18	25
Ma	3	10	17	24	—	Ma	1	8	15	22	29	Ma	—	5	12	19	26
Me	4	11	18	25	—	Me	2	9	16	23	30	Me	—	6	13	20	27
Ĵ	5	12	19	26	—	Ĵ	3	10	17	24	31	Ĵ	—	7	14	21	28
V	6	13	20	27	—	V	4	11	18	25	—	V	1	8	15	22	29
S	7	14	21	28	—	S	5	12	19	26	—	S	2	9	16	23	30
Julio					Aŭgusto					Septembro							
D	1	8	15	22	29	D	—	5	12	19	26	D	30	2	9	16	23
L	2	9	16	23	30	L	—	6	13	20	27	L	—	3	10	17	24
Ma	3	10	17	24	31	Ma	—	7	14	21	28	Ma	—	4	11	18	25
Me	4	11	18	25	—	Me	1	8	15	22	29	Me	—	5	12	19	26
Ĵ	5	12	19	26	—	Ĵ	2	9	16	23	30	Ĵ	—	6	13	20	27
V	6	13	20	27	—	V	3	10	17	24	31	V	—	7	14	21	28
S	7	14	21	28	—	S	4	11	18	25	—	S	1	8	15	22	29
Oktobero					Novembro					Decembro							
D	—	7	14	21	28	D	—	4	11	18	25	D	30	2	9	16	23
L	1	8	15	22	29	L	—	5	12	19	26	L	31	3	10	17	24
Ma	2	9	16	23	30	Ma	—	6	13	20	27	Ma	—	4	11	18	25
Me	3	10	17	24	31	Me	—	7	14	21	28	Me	—	5	12	19	26
Ĵ	4	11	18	25	—	Ĵ	1	8	15	22	29	Ĵ	—	6	13	20	27
V	5	12	19	26	—	V	2	9	16	23	30	V	—	7	14	21	28
S	6	13	20	27	—	S	3	10	17	24	—	S	1	8	15	22	29

Enkonduko

Kara leganto,

Pasis la duobla jubileo: 25a kongreso kaj 25-jara ekzisto de UEA. Post la festo ni revenu al la laboro, tio estis la diro en Kolonjo, kiam la organiza problemo trovis solvon, sur kiu ebligis konstrui *novan* UEA. Ne facile estis kunordigi, kungrupigi kaj kuncentrigi la diversajn dezirojn, bezonojn kaj atendojn de la Esperantista popolo. Tamen, post multe da peno kaj klopodo, UEA prezentas sin al vi hodiaŭ en sia nova vestaĵo, al kiu kunlaboris *ĉiuj* fortoj de nia movado neŭtrala. Ankoraŭ iom da tempo, kaj la vojo estos entute libera por nova pli vigla laboro.

Pasis la organiza disputo. Silentas la vortkanonoj. Regas spirito unuforma, direktita nur al unu celo: La progreso de nia kara lingvo Esperanto. Hodiaŭ — kiam krakas tiom da gravaj movadoj, kiam disfalas la plej potencaj entreprenoj — ni vidu kun interna ĝojo, ke nia ideo firme staras. Ne preterpasas la ondegoj de la ekonomia perturbo, ne mankas al niaj laborantoj la zorgoj, *sed* unu konstato ni povas tamen fari: Esperanto kaj ĝia movado ekzistas, laboras kaj progresas.

Pasis 1933, la jaro plej mizera de post 1919. Venis 1934, al kiu oni ligis aron da esperoj. Sed la nova tempo ne facile naskiĝas. Novaj nuboj de malfido aperis. *Sed* ni staras. Kaj ni staros.

Venos nova epoko, malsimila al tiu, kiun ni konis. Novaj metodoj necesas por venki, novaj postuloj kreas novajn organojn. Estos la proksima tasko de nia Universala Asocio, serĉi kaj trovi tion, kion postulas la nova tempo. Kaj UEA vokas la helpon de ĉiuj, kiuj komprenas, ke movado estas ne afero de unu sola homo, sed de miloj kaj miloj.

Venos nova laboro, pli streĉa ol la ĝisnuna. La novaj deziroj postulas rapidan plenumon, konforman al la nuna rapidiranta tempo.

Gvidu UEA la jena formulo: *Esti ĉio por ĉiuj por ĉiujn ĝajni*. Tio volas diri, ke UEA estu la kerno de la neŭtrala

Esperanto-movado, ke per ĝiaj servoj ĝi altiru la plimulton de la konvinkitaj Esperantistoj, unuvorte: ke ĝi estu *universala*.

Servi kaj utili, estu nia *Leitmotiv*, nia gvida penso. UEA estas la plej bela pruvo, kion kapablas taŭge kunĝitaj rimedoj, fortoj, ideoj. Ĝi ne estis verko de unu aŭ de du personoj. Ne, tute ne! Ĝi estas verko de miloj kaj miloj, reciproke, unu por alia. Kaj tiel ĝi estos por ĉiam.

Trovi en la nuna Jarlibro resumon de *via* laboro, de *via* ofero, de *via* espero. Pli modesta ol la pasinta, ĝi respegulas la tempon, en kiu ni vivas. Pli ampleksa en la parto Adresaro de Delegitoj, ĝi indikas la efikon de la atingita Interkonsento de la agantaj fortoj en Esperanto. Kaj se atentema leganto trovos erareton, mankon aŭ ellason, li klopodu kompreni, kiom komplike komenciĝis la jaro 1934. Kaj li indulgu la kompilinton.

Kaj fine: kun nova forto al nova laboro.

Genève, 28an de Aprilo 1934

Kauno Jakob

Festoj kun datoj nefiksitaj

1920—1940

Jaro	Pasko	Ĉieliro	Pentekosto	Unua Adventa Dimanĉo	Jaro
1920	4. Aprilo	13. Majo	23. Majo	28. Novembro	1920
1921	27. Marto	5. Majo	15. Majo	27. Novembro	1921
1922	16. Aprilo	25. Majo	4. Junio	3. Decembro	1922
1923	1. Aprilo	10. Majo	20. Majo	2. Decembro	1923
1924	20. Aprilo	29. Majo	8. Junio	30. Novembro	1924
1925	12. Aprilo	21. Majo	31. Majo	29. Novembro	1925
1926	4. Aprilo	13. Majo	23. Majo	28. Novembro	1926
1927	17. Aprilo	26. Majo	5. Junio	27. Novembro	1927
1928	8. Aprilo	17. Majo	27. Majo	2. Decembro	1928
1929	31. Marto	9. Majo	19. Majo	1. Decembro	1929
1930	20. Aprilo	29. Majo	8. Junio	30. Novembro	1930
1931	5. Aprilo	14. Majo	24. Majo	29. Novembro	1931
1932	27. Marto	5. Majo	15. Majo	27. Novembro	1932
1933	16. Aprilo	25. Majo	4. Junio	3. Decembro	1933
1934	1. Aprilo	10. Majo	20. Majo	2. Decembro	1934
1935	21. Aprilo	30. Majo	9. Junio	1. Decembro	1935
1936	12. Aprilo	21. Majo	31. Majo	29. Novembro	1936
1937	28. Marto	6. Majo	16. Majo	28. Novembro	1937
1938	17. Aprilo	26. Majo	5. Junio	27. Novembro	1938
1939	9. Aprilo	18. Majo	28. Majo	3. Decembro	1939
1940	24. Marto	2. Majo	12. Majo	1. Decembro	1940

Kronologio

La jaro 1934 de la Gregoria Kalendaro respondas al la jaro 6647 de la Juliana periodo. Ĝi respondas al:

- 5934 post la kreo de l' mondo laŭ la Genezo;
- 5694 de l' Hebreja Kalendaro, komenco de la jaro 5694 jaŭdon, 21. Septembro 1933, kaj la jaro 5695, lundon, 10. Septembro 1934;
- 4278 post la diluvo;
- 2812 post la fondo de Kartago;
- 2710 de la Olimpiadoj;
- 2687 post fondo de Romo;
- 1934 de la Juliana Kalendaro, komenco: dimanĉo, 14. 1. 1934;
- 1353 de la Hegiro (15. Aprilo 1934);
- 417 post la Reformacio de Luther;
- 158 post la sendependiĝo de Usono (4. Julio 1776);
- 142 post la Franca Respublika Kalendaro;
- 17 post la Rusa Revolucio (Februaro 1917);
- 12 post la marŝo al Romo (30. Oktobro 1922).

La solvo de l' organiza problemo.

Senkulpigu la verkinton de tiu ĉi teksto, kara leganto, se li ree uzas tiun ĉi tedan titolon „organiza problemo“. Decas tamen, ke okaze de enterigo de „kara proksimulo“ oni dediĉu al li kelkajn vortojn. La kutimo postulas ja, ke oni parolu bone pri li. Ĉu oni povus tion pri tiu ĉi mortinto, estas demando. Minimume la enterigo en Kolonjo, ĉe la Ferma Kunsido, montris, ke tiu ĉi morto ne postlasis ĉagrenon. Kaj la kora atmosfero, kiu regis, certigas, ke oni neniel funebros pri la „organiza problemo“.

Rerigardante de pli alta starpunkto, oni mire konstatas, kiom forte enradikiĝis la *spirito de solidareco* inter la laborantoj por nia lingvo. Trudiĝas la komparo kun aliaj movadoj kun homama tendenco, kie similaj opini-bataloj pri formo kaj enhavo kondukis al skismo aŭ al disfalo. Homaj ecoj ŝanĝas nur per metoda edukado, ne per simpla akcepto de doktrino aŭ evangelio.

La organizo de nia movado postulis unuecigon de fortoj. Tiun ĉi veron neniu kontraŭstaris. La tuta opini-batalo estas reduktebla al tre simpla formulo: ĉu nur *nacie*, ĉu nur *internacie* ni kunigu la Esperantistojn? La defendantoj de ambaŭ formoj havis tre bonajn argumentojn kaj malantaŭ si la nacie kaj internacie organizitajn Esperantistojn.

Antaŭ dudek jaroj la distingo estis alia: *nacie* = *por* kaj *internacie* = *per* Esperanto. Dume la sperto malpravigis tiun ĉi dispartigon.

Ja ne mankis planoj por kunigi UEA kaj la Naciajn Societojn. Estas kolekto da ili, de plej malsamaj konsideroj. La plej serioza projekto, trapensita en ĉiuj detaloj, logike konstruita kaj elegante formulita, estis de S-ro Page en Edinburgo. La estimplena aŭskulto, flanke de la kongreso en Praha (1921) ne povis forigi la dubon, pri la ebleco praktike labori laŭ ĝi. Evidentiĝis, ke necesis unue simpla aranĝo inter la agantaj fortoj de nia movado, ŝtupo al plia evoluo. La rezulto estis la „Kontrakto de Helsinki“ preparita de S-roj Chavet kaj Privat.

Temis pri formo de kunigo pure reprezenta al ekstero kun certaj taskoj komune subtenitaj. Konforme al la ekzistantaj konstruonoj jam pretaj, oni interligis ilin simple,

Estraro
5-7 membra

*Centra
oficejo.*

Komitato
24-32 anoj.

*Universala
Kongreso*



Konsilantaro

Izoluloj

*Fakaj societuj,
Institucioj,
Korporacioj.*

*Landaj Asocioj
aligitaj
la membraron*

*Landaj Asocioj
partoprenantaj*

Izoluloj

kaj surkonstruis tegmenton, la I. C. K. (Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado). El modesta komenco evoluigis bone funkcia centro de agado pri propagando internacia, regula observo de la movado por iniciati ion; krome estis sub ties zorgo la organizo de l' kongreso.

La kostoj de tiu ĉi agado estis kovritaj per 1. jarpagoj de la Naciaj Societoj kaj de UEA, 2. procentaĵo de l' kongreso, 3. libervolaj donacoj de „Patronoj“.

La vivo daŭre fluas. Tute kontentiga la formo trovita en Helsinko ne estis, kio ne estas la kulpo de ĝiaj iniciatintoj, sed de cirkonstancoj. Fine kaj rezulte de aro da okazintaĵoj — neniu estis plu kontenta. Tio finiĝis per nuligo de l' Kontrakto en Parizo 1932.

Tro konataj estas ja la sekvoj de tiu ĉi ĉesigo de kuneco de UEA kaj de Naciaj Societoj. La tiom harmonie pasinta kongreso en Kolonjo sendevice akceptis la deziron de ĉiuj, ke pri ĉio malagrabla estu metata la vualo de forgeso. Kaj tiel estul

Intence ni skizis en libera formo la evoluon de l' organiza problemo. En posta ĉapitro sekvas la klarigo pri la strukturo de l' nova organiza formo, resume formulita en la Interkonsento de Kolonjo.


La Interkonsento de Kolonjo.

Tiu ĉi dokumento, bazo de l' Esperantista agado internacia, estas logika sekvo de l' evoluo de post Helsinko. En Helsinko UEA estis rekonata kiel samvalora al la Naciaj Societoj, aŭ por uzi la tiaman esprimon: oficila. Ĝis tiam ĝi estis konsiderita kiel plej grava „faka“ aŭ „per-Esperanta societo“.

La ideo de Helsinko estis, doni al iuj entreprenoj komun-interesaj pli fortan apogon. Ni nur atentigu pri la klupodoj ĉe la Ligo de Nacioj, Telegrafa Unio, Ruĝa Kruco, k. a.

El la oficialeco de UEA fariĝis nun per la *Interkonsento de Kolonjo* la unka organizaĵo Esperantista, kiu plenumas tiujn lalo-ojn, necese faratajn el centro.

La granda problemo restis ĉiam, kiel enkorpiĝi la naciajn organizaĵojn (fakajn kaj aliajn) en UEA. Estas unua-



La funkciado de UEA

vice problemo financa, duavice problemo de l' organiza strukturo, varia en ĉiuj landoj. Ne estas eble, diktatore krei tion, kion sperto kaj opinio konsilus. El la senfina diskutado kaj — disputado kristaliĝis kelkaj veraĵoj. Ekzemple: La enlanda propagando, instruado kaj la reprezentado de l' movado kontraŭ aŭtoritatoj estas *nacia tasko*.

La aplikado de l' lingvo, la kreo de praktikaj servoj estas internacia afero. Kun tio estas logike ligata la plenumo de internaciaj taskoj (dokumentoj, kongresoj, rilatoj al internaciaj organizaĵoj, ktp.).

*


Trovi ponton inter ambaŭ formoj de organizo, intime ligi la akiron de novuloj (loka kaj nacia agadoj) al la konservado (internacia servado) estas efektiviĝita per la Interkonsento. Ĝi trudas al ambaŭ partoj novajn taskojn kun ŝarĝoj, sed forigas la efektivan aŭ nur imagitan duecon. Je organiza vidpunkto la naciaj societoj (kiuj de nun nomiĝas „Landaj Asocioj“) ne ŝanĝas la aspekton. Ili restas tute la samaj kaj absolute sendependaj pri agado propra. UEA konservas siajn karakterizajn trajtojn (neŭtraleco, individua membreco, regiona delegito, centra gvidado, senpera servado). Videbla signo de l' unueco estas la kotizo por 50 centimoj, per kio la plimulto de l' Esperantistoj fariĝas aŭtomate anoj de la granda Esperantista familio, ricevos membrokarton unikan kaj rajtas uzi la servojn de l' Delegitoj. La partopreno en la Komitato estas obligata al la Landaj Asocioj; ili nomas la delegitojn, ĉefdelegiton, kiu administras la aferojn de UEA.

La dua videbla signo de l' unueco estas la kreo de l' „Konsilantaro de la Esperanto-Movado“. Ĝi plenumas la deziron malnovan je *Esperantista Parlamento*, kies elementoj per iu ajn maniero finance partoprenas la movadon. Tio estas la logika sekvo de rajto akirita per plenumita devo.

La Centra Oficejo de UEA estas kompletigita per fako aŭ sekcio de *Eksteraj Aferoj*, kiu entenas la laborojn plenumitajn de l' I. C. K.-Oficejo.

Jen koncize la ĉefaj trajtoj de l' nova arango.

*



Konsisto de UEA: Rajtoj de la membroj

La transformo de UEA.

La transformo de l' nuna UEA al la nova organismo estas pli malpli finita. Tiu ĉi laboro estis duspeca: formala kaj administra. La unua rilatas al la Statuto, aprobita de l' Komitato, voĉdonita per la Delegitoj, kaj la starigo de l' nova komitato; la dua estas la plej komplika, iel eĉ delikata.

Per kelkaj linioj ni volas doni ideon pri la laboroj de UEA, precipe de la Oficejo, laŭ la nova organizo.

La difino de l' interna organizo kaj la dividon de la laborkampo fiksas la Statuto, Art. 48. Estas du fakoj, ĉiu gvidata de Direktoro.

a) Fakoj por Internaj Aferoj:

Estas konsiderataj kiel Internaj Aferoj:

la varbado kaj kontrolo de la membroj, la kotizoj, rilatoj kun la delegitoj kaj ĉefdelegitoj, organizo de oficialaj voĉdonoj; organizo de la servoj, karavanoj, ekspozicioj kaj similaj aferoj;

redaktado de la Jarlibro, parto de la revuo, oficialaj informiloj, bultenoj, presajoj;

arangado de l' premioj, gvidfolioj, propagandiloj; administrado de la revuo kaj de la biblioteko; organizo interna de l' Oficejo.

b) Fakoj pri Eksteraj Aferoj:

Eksteraj Aferoj estas:

la ĝenerala propagando de la lingvo, publikigo de tiurilataj broŝuroj kaj verkoj, klopodoj ĉe registaroj, aŭtoritatoj, internaciaj organizaĵoj, kongresoj ne-Esperantistaj, informado de la gazetaro, interrilatigo de la Esperantistaj societoj, ĝeneralaj rilatoj kun ili, la Lingva Komitato;

organizo de la Konsilantaro;

okazigo de la Universalaj kongresoj kaj de teknikaj konferencoj.

Jen en kelkaj linioj la resumo de la laboroj farotaj. Inter ili estas tiaj, kiaj devas esti plenumataj, kaj aliaj, kiuj povas kaj rajtas esti farataj. La povo dependas ĉefe de la disponeblaj rimedoj financaj.

Kiel oni vidas, troviĝas sub Internaj fakoj la ĝisnuna UEA grandparte, sub Eksteraj fakoj la I. C. K.-laborkampo. Certaj laboroj transiras laŭ akirota sperto de unu fakoj al alia, detalo

CENTRAL OFICEJO

Fakoj por Ekster. Aferoj

Okazigo de Universalaj Kongresoj
Okazigo de Teknikaj Konferencoj
Ĝeneralaj rilatoj kun la Lingva Komitato
Interrilatigo de la Esperant. Societoj
Informado de la Gazetaro
Klopodadoj ĉe Registaroj, Aŭtoritatoj
Publikigo de Propagandobroŝuroj
Internacia Propagando de la Lingvo

Fakoj por Intern. Aferoj

Administrado kaj Eldono	Revuo - Jarlibro
	Premioj
	Biblioteko - Oficeja Arango
	Turismoj - Presajoj
	Oficiala Bulteno
	Kontrolo de Memb. k. Deleg.
	Kaso - Librotenado
	Bibliografio
	Ekspozicioj
	Gazetabonoj
Servaro	Hoteloj
	Informoj
	Karavanoj
	Kongresa Servo
	Libertempoj
	Librovendo
	Propagando
	Reklamo
	Respondkuponj
	Turismo
Rilatoj kaj Arangoj	Delegitoj kaj Ĉefdelegitoj
	Landaĵ Societoj
	Aliaj Esperant. Societoj
	Estrar - Konferencoj
	Oficejaj Internaj

dependa de oportuneco. La Fakon pri Internaj Aferoj gvidas la Direktoro de UEA, Hans Jakob; la Fakon pri Eksteraj Aferoj Robert Kreuz, ĝisnuna Direktoro de I. C. K.

Tiuj laboroj plenumataj de la Centra Oficejo trudas tuj la penson, per kio vivas la Asocio. La enspezoj estas:

1. Kotizoj de la aktivaj kaj simplaj membroj;
2. pagoj de societoj por partopreni la movadon;
3. abonoj, entreprenoj, anoncoj, servoj;
4. licencpago de la Universala Kongreso;
5. patronoj;
6. donacoj spontaneaj kaj por fiksita celo.

La enspezoj de l' Asocio estas redonataj grandparte al la membroj sub formo de liveraĵoj. Konvenas priskribi tion.

La membraro de UEA konsistas el:

Aktivaj Membroj, estas kvin grupoj:

1. Membro kun Jarlibro (MJ): ricevas membrokarton, servokuponaron, Jarlibron, kaj rajtas premion de frupago.
2. Membro-Abonanto (MA): ricevas membrokarton, servokuponaron, Jarlibron, revuon „Esperanto“ dum unu jaro kaj premion de frupago.
3. Membro-Subtenanto (MS): ricevas membrokarton, servokuponaron, Jarlibron, revuon „Esperanto“, premion de frupago, premion de Subtenanto.
4. Membro Dumviva (MD): estas dumviva Membro-Abonanto kun ties plenaj rajtoj kaj ricevas laŭeble aliajn eldonaĵojn de l' Asocio.
5. Membro Honora (MH): ne bezonas pagi kotizon, ricevas Jarlibron kaj revuon.

Simplaj Membroj (M), aligataj de la Landa Asocio: ricevas internacian membrokarton, servokuponaron, kaj rajtas uzi la servon de informpetado.

*

La elspezoj de UEA dividiĝas en tri kategorioj: 1. Oficejo kaj akcesoraĵoj; 2. liveraĵoj al la membroj kun la afranko, presaĵoj kaj materialo; 3. salajroj.

Laŭprocenta divido: 1. 10 ĝis 12 %, 2. 58 ĝis 60 %, 3. 28 ĝis 30 % de la efektivaj elspezoj, laŭ la sumoj de la lastaj kvin jaroj.

Grava malhelpo por egaligi elspezojn per enspezoj estas la necerteco de l' plimulto de monoj. Hodiaŭ ekzistas nur tri monoj konsiderindaj, kiuj konservas la oran valoron. Tio signifas, ke starigante budĝeton dum Novembro, estas risko, ke monaton poste la atendataj enspezoj grave malgrandiĝos. Tre instruan bildon oni ricevas per jena tabelo pri la meza sumo ricevita por la plej grava kategorio de la membraro: la Membro-Abonanto. La oficiala kotizo estas 12,50 Frk. svis. Pro la favorprezoj tiu ĉi sumo neniam estis ricevita. Sed metode la meza sumo supreniris, dank' al pliboniĝo financa, kaj atingis plej altan punkton en 1928. Tiam la Centra Kaso ricevis 8,90 Frk. svis. meze por MA; jam en 1929 ĝi falis al 8,58 kaj daŭrigis tiun ĉi malsupreniron ĝis 7,25 en 1933. Plej kruela bato por ni estis la forlaso de l' ora monbazo en Britujo, Usono kaj en la skandinavaj landoj. Ekzemple: MA dana, norvega aŭ sveda pagas 10 Kr.; tio estis ĝis 1931 inter 13,— ĝis 13,50 Frk. svis., do iom pli multe ol la norma prezo. Kaj hodiaŭ? Nu, estas inter 7,50 ĝis 8,— Frk. svis., sekve perdo de 30 ĝis 35 %!

Kaj kion diri pri la tiom respektita, amindumita, eĉ adorita *Dolaro*? La plumo rifuzas sian servon por daŭrigi la priskribon.

Kiel reagi? Malaltigo de la budĝeto! Tion ni faris! Tamen tio ne sufiĉas. Kaj tie venas nia insista peto al vi ĉiuj: *Subtenu vian Asocion per pli alta kotizo kaj aligu kiel Subtenanto!*

Inter la novaj taskoj de UEA estas la *Eksteraj Aferoj*, pri kies konsisto kaj amplekso ni jam skribis. Ĝi estas la instiga centro, kiu prientantas la eblecojn, kie nia lingvo povus servi; ĝi estas la ligilo de la landa propagando al la internacia.

Ĉi tiuj taskoj postulas iniciaton, kapablon kompreni kaj kapti okazon. Sed tiuj eblecoj profiti okazon por penetri en interesan sferon, malfermi pordojn ŝlositajn, dependas de l' rimedoj disponeblaj. Propagando estas laboro je longa templimo, la efiko ne estas tuj konstatebla — kaj nenia mona profito estas ebla. Demandu propagandistojn de aliaj movadoj, kiom da zorgoj kaŭzas la trovo de la mono por tiu ĉi bezono.

Por efike helpi al tiu ĉi valora laboro plenumata de la *Fako por Eksteraj Aferoj*, ekzistas la ebleco de libervola donaco. Samideano, kiu donacas jare la sumon de 100 Frk. svis., estas *Patrono de UEA* kun la rajto aparteni al la *Konsilantaro de la Esperanto-Movado*.

Rigardo antaŭen.

Je la fino de 1932 nia movado troviĝis proksime al dis-
iĝo. La ekonomia katastrofo kun ĝiaj variaj sekvoj jam in-
fluis senteble la intereson de la publiko al idealisme-praktikaj
klopodadoj. Ĉiuj entreprenoj Esperantistaj konstataj mal-
vigligon de l' agado kaj kun ĝi timigan malkreskon de la
enspezoj. Dufronta batalado kaj plie la opini-batalo pri la
plej bona organizo.

Tute alia estas la aspekto je la fino de 1933. Ĝojo pri
la atingita interkonsento, ĝojo je nova laboro, senigita de
ĉiu disputo, ĝojo pri la forto, kiun havas nia movado. Sen
speciala kredo aŭ doktrino, ni ĉiuj laboras por komuna idealo,
la deziro de paca kunlaboro intergenta. Je tio necesas unue,
ke ni mem donu la ekzemplon de tio, kion ni deziras! Ja
impresas strange, ke batalantoj por idealo de intergenta paco
ne povis interkonsenti pri la plej bona maniero tion efektiviĝi!

La paco nun regas en Esperantujo. Ke ĝi estu daŭra
kaj vera, tio estas ĉies deziro. El la bela nombro de kore-
spondaĵoj, ricevitaj post la kongreso, ni vidas kun emocio,
kiom forte impresis la atingita interkonsento. Ne ĉesos per
ĝi la tagaj penoj kaj zorgoj, sed niaj fortoj — liberigitaj de
frata batalo — duobligas, ja triobligas por atingi la celon
tiom bele esprimitan en la kanto, kies vortoj estis tradukitaj
de Dro Zamenhof:

Homoj en la oriento, homoj en la okcidento,

En la sud' kaj en la nord',

Alte teni homan nomon, kore ami ĉiun homon

Estu nia liga vort', estu nia liga vort'.

La desegnon de la grafikoj pri la nuna UEA bonvolis plenumi
S-ro Ing. Wolf Zickler en Berlin, al kiu ni esprimas koran dankon.

Esperantista Lingva Komitato

La Esperantista Lingva Komitato konsistas el lingvaj
kompetentuloj, kies nombro ne estas limigita. La anoj de la
L. K. estas elektataj de la Lingva Komitato mem por naŭ
jaroj laŭ listo starigita de la Akademio. Rajtas prezenti
kandidatojn la Naciaj Societoj, UEA kaj la Fakaj Societoj.
Nuntempe la L. K. konsistas el 134 anoj. Laŭ la lingvo
partoprenas: Angla 14, Armena 1, Bulgara 1, Cefia 5,
Cina 1, Dana 1, Estona 1, Finna 1, Flandra 2, Franca 20,
Germana 20, Greka 1, Hebrea 3, Hispana 6, Holanda 5,
Hungara 5, Itala 7, Japano 2, Kataluna 5, Ladina 1,
Latva 1, Litova 1, Norvega 2, Persa 1, Pola 8, Portu-
gala 4, Rumana 1, Rusa-Blankrusa-Ukraina 13, Sveda 3.

Esperantista Akademio

Supera komisiono de la Lingva Komitato. Prezidanto:
M. Rollet de l'Isle; Vicprezidantoj: N... kaj N... Baldaŭaj
balotoj kompletigos la nombron de la Akademianoj (18) kaj
ebligos la elekton de la laŭregula estraro. — Direktoro de
Fakaj Sekcioj: Dro W. Lippmann. — Membroj: J. Baghy,
W. Bailey, L. Belmont, P. Christaller, W. E. Collinson, Pierre
Corret, V. Inglada, G. Isbrücker, B. Migliorini, P. Nylén.
Setälä, Stamatiadis.

Akademias Korespondantoj: S-ro Rollet de l'Isle (Sci-
enca kaj Teknika Vortaro), S-ro E. Drezen (Rusa lingvo),
S-ro M. Sola (Kataluna), S-ro A. Tellini (Ladina), Dro
Leono Zamenhof (Pola), S-ro Edv. Backheuser (Portugala).

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio.

Neregule. — F.: 1930, 22 p., 22,5 × 15 cm. — Red.
kaj Sekr.: R. de Lajarte, Fontenay-sous-Bois, Seine. — Adm.:
Esperantista Centra Librejo, 11, rue de Sèvres, Paris VI. —
Ab.: Senpage por la anoj de l' L. K., aliaj 5 Fr. sv. jare.

Nomaro de l'anoj de la Lingva Komitato

(La anoj kun steletoj montras la anojn de l' Akademio)

Andrejev, A. P., Kudrinskaja, 18, Sadovaja, Moskvo
Archdeacon, Ernest, surŝipe de „Jaŝto Esperanto“, Quai
Carnot, St. Cloud, Seine-et-Oise (Francujo)
Arnhold, Dro Heinrich, Waisenhausstr. 20, Dresden
Aymonier, Camille, 34, Allées Damour, Bordeaux, Gironde
Bachheuser, Dro E., Caixa postal 2494, Rio de Janeiro
Baghy, Julio, Rottenbiller ut. 66-I-20, Budapeŝt VII
Bailey, Th. G., Laganville, Nether Street, London N 3
**Bailey*, W., Mara Domo, Glan-y-Mor Road, Penrhyn Bay,
Caernarvonshire (Britujo)
Baird, F-ino Jane, 95, Bellevue Road, Edinburgh (Skotl.)
Bastien, Louis, 116 Rue de Vaugirard, Paris VI
Behrendt, Arnold, Hohenstaufenstr. 24, Berlin W 30
**Belmont*, Leon, Marszalkowska 97 A, Warszawa (Polujo)
Bennemann, Paul, Tiefestr. 5, Leipzig-C. 1
Bianchini, P. J., Cimpello de Pordenone, Friuli (Italujo)
Blaise, S-ino M., 19, Litchfield Av., Morden, Surrey (Britujo)
Blicher, Martin, Bredgade 63, A III, Kopenhago (Danlando)
Blok, H., Amstellaan, 65, Amsterdam (Nederlando)
Bobin, M., 21 Rue Vital, Paris XVIIe
Bodó, K., Szabolcska Nihály ucca 18, fsz. 2, Budapeŝt I
Bofill, Narciso, Sindicato 188-I-ero, Palma de Mallorca
Bonnevie, H., Bergslisens gate, 11, Oslo (Norvegujo)
Boucon, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Haute Savoie
Bremon y Masgrau, Dro J., Balmes 102, Barcelona
Bugge-Paulsen, R. E., Schivesgate 4-I, Oslo (Norvegujo)
Bulthuis, H. J., Kamillestraat 37, Hago (Nederlando)
Bünemann, Oskar, Isestr. 79, II, Hamburg 37 (Germanujo)
Butin, Max, Kronprinzenstr. 33, Bad Godesberg (Germanujo)
Butler, Montagu C., 142, High Holborn, London W. C. 1
Chavet, Gabriel, Rue Gauthier de Chatillon 6, Lille
**Christaller*, Paul, Neue Weinsteige 61, Stuttgart (German.)
Cogen, Léon, 52 Drève, Ninove (Belgujo)

**Collinson*, W. E., 9, Bertram Road, Liverpool
**Corret*, Dro Pierre, 133 Boulevard Brune, Paris XIV
Couteaux, J., Hôpital Cochin, 27 Fbg. St. Jacques, Paris XIVe
Cseh (Ce), Andreo, Oostduinlaan, 32, Hago (Nederlando)
Czubrynski, Dro A., Pilsudskiego 43, Lask (Polujo)
Cernohvostov, G., Alberga (Finnlando)
Dalmau, Delfi, 245 Valencia, Barcelona (Hispanujo)
Deligny, Ernest, 4 rue Allent, St. Omer (Francujo)
Demidjuk, G., Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskvo 6
Diez, F., Zurbaran 9, Begona, Bilbao (Hispanujo)
Döhler, Dro W., Rosenplatz 11, Riesa a. Elbe (Germanujo)
Dombrowski, A., Rotušės Aikšte 6, Kaunas (Litovujo)
Domingues, C., Rua Marechal Floriano 212-10, Rio de Janeiro
Dreher, L., Starowislna 37, Krakow (Polujo)
Dresen, F-ino Helmi, Postkast 6, Tallinn (Estonio)
Drezen, Ernesto, Skatertni 3, kv. 5, Moskvo 69 (Ruslando)
Ellerbeck, Dro ing. L., Bayerische Str. 31, Berlin W 1
Ellersiek, F., Wilmsstr. 5, Berlin SW 61
Esselin, A., 10 Place Vintimille, Paris IX
Fischer, Henriko, str. Dr. Estrate, 10, Bucuresti, aŭ
Cuza Voda, 73, Galatz (Rumanujo)
Ghezze, Dro A., Via Montecucco 6, Trieste (Italujo)
Grau Casas, Jaume, Diputació, 50, Barcelona
Grau Casas, Josip, Sant Quinti de Mediona (Katalunujo)
Grenkamp-Kornfeld, S., 117 Bd. Jourdan, Paris XIV
Grots, Edgaro, Elizabetes iela 9, dz. 33, Riga (Latvujo)
Harvey, W., Craighill Gardens 1, Edinburgh (Skotlando)
Heilker, P., Hoofdorp (Nederlando)
Hodakovski, T., Legjonow 17, Nowy Sacz (Polujo)
Hohlov, N., Marjino 22, Moskvo 75 (U. S. S. R.)
Hromada, Rudolf, Socharska 333, Praha VII
**Inglada*, V., Prof., Escuela superior de Guerra,
Chinchilla, 2, Madrid
**Isbrücker*, J. R. G., Oostduinlaan 32, Hago (Nederlando)
Jung, Teo, Brüsseler Str. 94, Köln a. Rh. (Germanujo)
Kalocsay, Dro K. de, Szentkiralyi utca 3, I, 10, Budapeŝt VIII

Kamaryt, Dro Stan., ul. Zochova 3, Bratislava (Ĉeĥoslovakujo)
Karolczyk, S., Widok 19, Warszawa (Polujo)
Kastner, Paul, Ilica 4, Zagreb (Jugoslavujo)
Kawasaki, 409 Hamagutityo, Sumiyosi-ku, Osaka (Japanlando)
Kenn, Dro Won, P. O. Box 88, Kanton
Kostecki, J., Długa 28, Warszawa (Polujo)
Krestanoff, Ivan, ul. 6 Septemvri 2, Sofia (Bulgarujo)
Kreuz, Robert, 2 rue Michel Roset, Genève (Svislando)
Kühnl, Edvardo, Ave. Ejército 306, Santiago de Chile (Ĉilo)
La Colla, Via Dandolo, 24, Roma
Laignier, M., 30, rue Dupont-des-Loges, Nancy (Francujo)
Lajarte, R. de, 4 Villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois, Seine
Lejzerowicz, J., Skwerowa 20, Lodz (Polujo)
**Lippmann*, Dro Waller, Grimmaische Str. 24, Leipzig
Lundgren, John, Hedemora (Svedlando)
Mangada-Rosenörn, J., Caserno del Pacifico, 1a Reg. de Infanteria, Madrid (Hispanujo)
Merchant, J., 13, Hartington Road, Sheffield (Britujo)
Meštan, Pastro F., Piaristen-Kollegium, Krems a. D. (Aŭstrio)
**Migliorini*, Bruno, Via Alessandro Poerio 33, Roma 144
